

# Enhavo

- **anoncoj**

Helpu organizi E-grupon por malliberuloj; Novaj kaj rabatitaj libroj en la retbutiko; Venu al la Landa Kongreso en Seatlo!; NASK 2018

- **media hits**

*Tupelo Quarterly*; *The New York Times*; *Freakonomics Radio*

- **What are the various funds for?**

demandu al Usona Esperantisto - Charlotte Burton  
An overview of the funds maintained by Esperanto-USA, their purposes, and how you can contribute.

- **Simpla peto / A Simple Request**

de la prezidanto - Filipo Dorcas

Se vi uzas la sociajn komunikilojn, bonvolu "ŝati" kaj "sekvi" Esperanto-USA. Poste plusendu aŭ verku ion pri la informajo, kiun vi trovas.

- **de la estraro**

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

- **Zamenhofa festparolado**

loke - Orlando E. Raola

Teksto kiun prezentis Orlando Raola ĉe la Zamenhof-bankedo de SFERO en Decembro.

- **Ruth Ke vess-Cohen**

laŭdoj - Charlotte Burton

Dua artikolo en nova rubriko, en kiu ni prezentas agadojn de niaj membroj.

- **leterkesto**

Hazarda renkontiĝo

- **Rakonto pri uragano Harvey**

loke - Steve Eichblatt

Kreskinte apud la Golfo de Meksiko, en Hustono, mi pensis ke mi konas uraganojn.

- **La ŝtelanta klaŭno**


enigmoj - Daĉjo Rutan

Profesoro Ŝibolet ĝuis distraĵojn dum sia ĉiujara vizito al la Granda Cirko, kiam li aŭdis kverelon ekster proksima ruldomo. Estis klaŭno, kaj du virinoj.

- **"Ido"**

senintenca esperantaĵo? - Steve Eichblatt

Ĉu sekreta nesto de la Idistoj?



# *Usona Esperantisto*

**Redaktoro / Editor:** HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

*Usona Esperantisto* estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia TTT-paĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style manual on our website.

## media hits

---

### Tupelo Quarterly

In October, the online literary journal *Tupelo Quarterly* published a review of *Uncle Leyb* [<https://goo.gl/kbezWF>], Sebastian Schulman's English translation of an Esperanto short story by Mikaelo Bronštejn. In addition to the review, the journal had the following to say:



In the small, but vibrant world of Esperanto letters, there are few figures more beloved than Mikaelo Bronshtejn (b. 1949). Born in Ukraine and based in the Russian city of Tikhvin, Bronshtejn is a prolific novelist, poet, literary translator, and famed singer-songwriter who has written numerous books and recorded over a dozen albums of original songs in Esperanto and Russian. [...]

Sebastian Schulman is a literary translator from Yiddish and Esperanto. His writing and translations have appeared in *Words Without Borders*, *The Dirty Goat*, *Forward*, and elsewhere. His first book-length translation, of Spomenka Stimec's Esperanto novel *Croatian War Nocturnal*, was published with Phoneme Media in 2017. He teaches regular courses in Jewish and Russian history and culture and other topics at Smith College, Hampshire College, and at the Yiddish Book Center, where he also serves as the director of the translation fellowship program.

### The New York Times

The Esperanto Society of New York's celebration of Zamenhof's birthday was featured in *The New York Times* on December 21st [<https://goo.gl/aEzoJd>]. Despite a small typo in the title (*Feliĉa Ferioj! Toasting the Holidays in Esperanto*), author Corey Kilgannon



did an admirable job of profiling the club and its members, including mentions for Neil Blonstein, Miko Brandini, Max Howald, Robin Hill, Barbara Brown, Sofiya Soskina and Humphrey Tonkin. An excerpt:

[...] Renata Kaczmarska, 50, a Polish immigrant, said she learned Esperanto as a teen in Warsaw, and the first thing she did when she moved to New York in the 1990s was seek out the Esperanto Society to bond with speakers.

Through her Esperanto connections, she applied for a job at the United Nations, where she still works.

"She represents the Esperanto dream," said James Woodstock, 48, an immigrant from Moscow, who can read more than 20 languages and who collects Esperanto currency.

Ms. Kaczmarska said that Zamenhof Day was a bonus in her holiday season, and a chance to honor Esperanto and her countryman who created it.

"It's something to be proud of," she said.

### Freakonomics Radio

Back in September *Freakonomics Radio* published a set of podcasts addressing the idea of universal languages. The last podcast was devoted to Esperanto in particular [<https://goo.gl/uzQfhm>], and included over 30 minutes of interviews with members including Esther Schor, Chris Johnson, Maria Murphy, Orlando Raola, and Humphrey Tonkin. The interviews with reporter Stephanie Tam were conducted at 2017's *Landa Kongreso* in Raleigh.



The testimonials give listeners not only an overview of Esperanto's history, but also an idea of the vibrant and trusting community it often creates among speakers. Member Lee Miller touches on this

phenomenon in a personal anecdote, incidentally revealing himself as an easy mark for enterprising participants at next year's *Kongreso*:

If I were in a group like this and I needed somebody to hold my wallet, with all my money

in it, I would hand it to an Esperanto speaker in full confidence that whenever I came back, they would hand it back to me and my money would still be in it.

## de la estraro

---

En ĉiu numero de *UE* mi petas la estraranojn iomete raporti lastatempajn farojn aŭ alimaniere komunikiĝi kun vi, la membraro.

Ni bezonas ankaŭ vian partoprenon, karaj membroj, do bonvolu sendi al la redakcio viajn demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro. Ni bonvenigas reagojn en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

— *La redaktoro*

---

### Charlotte BURTON, Direktoro

Tiuj ĉi estis du tre okupitaj monatoj! Ni pluigis nian voĉon en sociaj komunikiloj. Ni komencis nian unuan kampanjon por allogi novajn membrojn. Ni lernis kaj studis plu pri niaj fondusoj. Ni komencis reklami per Guglo al la multaj novaj esperantistoj, kiuj jam ne konas nin. Ni plu serĉas regionajn helpantojn, kiuj helpus al la lokaj grupoj en siaj regionoj. (Se vi interesiĝas jen pli da informo [<https://tinyurl.com/RegionajHelpantoj>]).



Mi mem kreis kelkajn bildojn, kiujn vi eble vidis en Facebook aŭ Twitter. Ni uzis viajn rakontojn pri via tempo en Esperanto-USA por montri al novaj esperantistoj tion, kion Esperanto-USA povas fari por ili. Cetere, mi esploris pri niaj fondusoj, por ke ni komprenu pli bone, kion ni havas kaj kiel ni povas helpi vin kaj viajn projektojn. Mi ankaŭ helpis la estraron esplori pri kiel komunikiĝi pli efike kun la lernantoj de Duolingo.

Mia celo por ĉi tiuj monatoj estis esplori pli profunde niajn helpilojn por vi kaj komunikiĝi pli efike kun la membraro kaj la kreskadanta esperantistaro en Usono.



### Paige FELDMANN, Direktoro

Kion vi volas vidi sur niaj paĝoj en sociaj komunikiloj (ekz. Twitter, Facebook, Reddit, ktp)? Ni volas aŭdi de vi. Bonvolu dividi kun ni viajn pensojn: sendu al ni mesaĝon en Facebook.



### Nikvo WOODS, Direktoro

[Nikvo pretigas aferojn por la venonta LK en Seatlo; lia raporto ĉi-foje estas anonco pri ĝi, do mi metis ĝin sub la rubriko anoncoj. —Red.]



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- Ben SPEAKMON, Vicprezidanto
- Chris NELSON, Sekretario
- George BAKER, Kasisto
- Jessica GRASSO, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro

# What are the various funds for?

Charlotte BURTON

As we increase our efforts to listen to our members and improve communication, Esperanto-USA has heard so many wonderful ideas for improvements and new projects as well as wonderful questions about what level of support we can and cannot offer to various causes.

The treasurer's report lists many funds, as does the *Donations* section of our online store

[<http://retbutiko.esperanto-usa.org>

[/index.php?main\\_page=index&cPath=120](http://retbutiko.esperanto-usa.org/index.php?main_page=index&cPath=120)]. It can be hard to wade through and figure out which funds do what and how members can make use of them. To make sure Esperanto-USA and your donations are working for you, we at Esperanto-USA have done the research for you about 12 of the funds which can help you the most.

[Unless otherwise specified, contact information for individuals mentioned below can be found in the *Membrolisto* sent to all members. –Ed.]

## **General Fund**

- This fund supplies all of Esperanto-USA's day-to-day expenses, including keeping the Central Office up and running. If you want to support Esperanto-USA in all it does, this fund is for you.
- If you have an idea for a project that doesn't fit into any other fund, bring your idea to the Board of Directors [<http://esperanto-usa.org/eusa/board/>].
- You can donate via PayPal [<http://esperanto-usa.org/eusa/>] or online at our online store [<http://tinyurl.com/EUSAGeneral>].

## **Amikeco Translimen Fund**

- The Amikeco Translimen Fund helps Esperantists outside the USA attend the *Landa Kongreso*. If you want to make our national

Congress a little more international, this fund is for you.

- Contact Orlando Raola for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSA-Amikeco>].

## **Children Around the World Fund**

- The CATW Fund supports projects designed to help elementary-age children learn Esperanto. If you have an idea to further Esperanto education for children, this fund is for you.
- Contact Ron Glossop for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSA-CATW>].

## **Educational Video Fund**

- The Educational Video Fund was created to support *Pasporto al la Tuta Mondo* and also supports the production of other Esperanto educational videos. If you have an idea for helping others learn Esperanto through video, this fund is for you.
- Contact Lusi Harmon for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSAVideo>].

## **Goldman Fund**

- The Goldman Fund supports the postal correspondence course. If you want to support Esperanto education through the postal service, including for those without regular access to computers, this fund is for you.

- Contact Dorothy Holland for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSAGoldman>].

## **Harlow Literatura Fund**

- The Harlow Literatura Fund supports the costs of putting Esperanto literature online. If you want to help put Esperanto literature on the Internet for all, this fund is for you.
- The Harlow Literatura Fund does not currently have an administrator. If you are interested in supporting this collection, contact the Board of Directors [<http://esperanto-usa.org/eusa/board/>] of Esperanto-USA.
- You can find the current collection online [<http://literaturo.org/HARLOW-Don/>].

## **Klara Zamenhof Fund**

- The Klara Zamenhof Fund supports first-time membership dues for deserving members. If you know someone who wants to become a member but does not currently have the money to do so, this fund is for them.
- Contact the Board of Directors [<http://esperanto-usa.org/eusa/board/>] for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSAKlaraZ>].

## **NASKE Fund**

- The NASKE Fund helps provide NASK scholarships for students in need. If you want to attend NASK but need help with the costs, or if you would like to support others in their Esperanto education, this fund is for you.
- Contact Ellen Eddy for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSA->

NASK].

## **Publication Fund**

- The Publication Fund supports the creation and publication of original Esperanto literature as well as translations. If you are working on an Esperanto book but need extra finances to get it published, this fund is for you.
- Contact Tim Westover for more information about this fund.
- This fund is supported by a portion of profits from books it helps publish.

## **Schulze Education Fund**

- The Schulze Education Fund supports expenses related to Esperanto education. If you have a plan for improving Esperanto education in the USA, this fund is for you.
- Contact Ron Glossop for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSAEducation>].

## **Thompson Fund**

- The Thompson Fund helps cover travel expenses for young Esperantists to get to national or regional Esperanto gatherings, like NASK, the Landa Kongreso, and more.
- Contact Lusi Harmon for more information about this fund.
- You can donate online [<http://tinyurl.com/EUSAThompson>].

## **Wolff Publicity Fund**

- The Wolff Publicity Fund is for publicity and mass media projects to reach large numbers of non-Esperantists. If you have an idea for how to let the world know about Esperanto, this fund is for you.

# Simpla peto / A Simple Request

Filipo DORCAS

**L**a esperantista komunumo en Usono kreskas, plejparte danke al la nekredibla sukceso de Duolingo [<https://www.duolingo.com/>] kun la mirinda helpo de **Chuck SMITH**, **Lee MILLER**, **Ruth KEVESS-COHEN** (Vidu *Laŭdoj* en ĉi tiu numero), **Thomas ALEXANDER**, kaj aliaj. Multaj el tiuj lernantoj de Esperanto ne konscias pri Esperanto-USA aŭ pri lokaj grupoj en Usono. Ni bezonas vian helpon helpi tiujn studantojn trovi kaj renkonti samideanojn por ke ili ankaŭ fariĝu parto de la esperantista komunumo. Nur ĉirkaŭ 1% de la studantoj en Duolingo vizitas la forumojn kie ni publikigas informojn pri lokaj grupoj kaj agadoj.

Ekzistas ankaŭ aliaj retejoj, kiuj kreskas, kiel la nova Lernu [<https://lernu.net/>].

**Vi povas helpi.** Se vi uzas la retejon Facebook [<https://www.facebook.com/esperantousa/>] aŭ aliajn sociajn komunikilojn, bonvolu “ŝati” (*like*) kaj “sekvi” (*follow*) Esperanto-USA. Vidu nin ankaŭ en Reddit [<https://www.reddit.com/r/EsperantoUSA/>] kaj Twitter [<https://twitter.com/esperantousa/>]. Poste plusendu aŭ verku ion pri la informiĝo, kiun vi trovas. Ni povas helpi niajn amikojn per renkonti ilin en ne-esperantistaj kanaloj kaj aplikaĵoj (apoj).

Do, restu en kontakto, plusendu, renkontiĝu kaj kresku kun ni!




The Esperanto community in the USA is growing, largely thanks to the incredible success of Duolingo [<https://www.duolingo.com/>] with the superb help of

Chuck Smith, Lee Miller, Ruth Keves-Cohen (See *Laŭdoj* in this issue), Thomas Alexander, and others. Many of these students of Esperanto are not aware of Esperanto-USA or local Esperanto groups in the USA. We need your help in helping these students find and meet fellow Esperanto speakers so that they too may become a part of the Esperanto community. Only about 1% of the students in Duolingo frequent the forums where we post information about local Esperanto groups and activities.

There are other sites which are also growing in popularity, such as the new Lernu [<https://lernu.net/>].

You can help. If you use Facebook [<https://www.facebook.com/esperantousa/>] or other social media, please “like” and “follow” Esperanto-USA. Check us out also in Reddit [<https://www.reddit.com/r/EsperantoUSA/>] and Twitter [<https://twitter.com/esperantousa/>]. Then, repost or write something yourself about the information you find. We can help our friends by meeting with them in non-Esperanto channels and apps.

So, stay tuned, repost, connect, and grow with us!



**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

<[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)>

# Zamenhofa festparolado

Orlando E. RAOLA

Jen iomete redaktita versio de teksto kiun prezentis nia membro kaj eksprezidanto Orlando RAOLA ĉe la Zamenhof-bankedo de SFERO (*San Francisco Esperanto Regional Organization*) en Decembro.

**B**onvenon ankoraŭfoje al la Zamenhofa Bankedo, al la renkontiĝo kie la membroj de SFERO ĉiujare ariĝas ĉirkaŭ tablo, manĝas kaj trinkas ĝissate, kaj dume honorigas la memoron de Ludoviko Lazaro, aparte dankante lian eksterordinaran donacon al la homaro: La Internacia Lingvo Esperanto.

Mi kompreneble estas ege ĝoja denove esti elektita por liveri la festparoladon dum tiu ĉi aranĝo, kiun mi preskaŭ seninterrompe partoprenas de pli ol dudek jaroj. Pasintan jaron mi bedaŭrinde ne ĉeestis la bankedon, ĉar mi vojaĝis eksterlanden okaze de mia sabata forpermeso. Kune ni migris tra pluraj restoracioj en nia bela golfa regiono. Kune ni spertis ekaperon de novaj vizaĝoj, la maturiĝon de junuloj, la adiaŭon de pluraj tre amataj konatoj. Sed ĉiam restis kaj restas inter ni la korvarmiga sento de kunesto, la feliĉiga ideo, ke ni estas kaj restas, pli aŭ malpli multnombraj, pli aŭ malpli junaj, ne gravas, kio gravas estas la rimarkinda daŭripovo de la ideo kaj kunsento kiu venigas nin ĉiujare al la bankedo. Mi substrekas *ĉiujare*, ĉar vere estas homoj kiujn mi renkontas nur unufoje jare en la Zambank, kaj ili ja estas same familiaraj kaj proksimaj kiel tiuj kiujn mi renkontas pli ofte, en la monataj aranĝoj de SFERO aŭ aliloke.

Kiel vi scias, en la reala mondo mi estas profesoro pri kemio. En la jaroj kiam mi dediĉis mian tempon al scienca esplorado, antaŭ ol fariĝi profesoro mi magistriĝis kaj doktoriĝis, mi laboris intense en pluraj laboratorioj tra la mondo, kie la sciencistoj funkciigas gigantajn maŝinojn nomitajn *sinkrotronoj*. Miaj esploroj estis kondukataj en la sinkrotronoj de Stanford, proksime de ĉi tie, Advanced Photon Source en Argonne, Ilinojso, Spring8 kaj Photon-Factory en Japanujo. Mi ankaŭ vizitis la sinkrotron-laboratoriojn en Berkelio, en

Lund, Svedujo kaj en Didcot, proksime de Oksfordo, en Britujo. En sinkrotrono, pere de elektraj kaj magnetaj kampoj, oni kreas intensan lumon, fakte plejparte ikso-radiojn kaj ultraviolan lumon, sed finfine lumon, treege intensan, kvazaŭ peceto de suno enestus ĝuste tie, ene de tiu giganta maŝino. Vera mirindaĵo de la moderna scienco, kiu permesas ĝisfunde pridemandi naturon kaj malkovri ĝiajn plej intimajn sekretojn. Per brilega lumradio.

Lumo estas unu el la plej bazaj ideoj kaj kulturaj simboloj de la homaro. Pripensu kiel en ĉiuj mondkonceptoj kaj mitologioj, ĝi ludas centran rolon. Ne nur lumo, sed ankaŭ ĝia kontraŭulo, mallumo. La lukto inter lumo kaj mallumo estas universalaĵo, ĉie trovebla.

En la jud-kristana tradicio: “mallumo estis super la abismo... kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estis bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo.”

Por la ĉinoj de la pratempo, la lumiga drako Zhulong rekreis la lumon kaj la mallumon per ĉiutaga palpebrumo.

Por multaj inuitoj, temas pri junulino kiu postkuras fiulon, ŝi fariĝas la luno kaj la ombroj, dum li estas la suno kaj la lumo.

Kaj tiel plu, kaj tiel plu, *ad infinitum*. Sed kiel rilatas miaj filozofiaj cerbumadoj pri lumo al la laŭda parolado kiun mi supozeble devas liveri hodiaŭ? Nu, mi devas konfesi, ke ne la unuan fojon mi revizitas tiun ĉi pecon de la zamenhofa verkaro, ne pro tio, ke li ne verkis multajn aliajn citindajn verkojn, sed pro tio, ke *La Vojo* estas mia plej ŝatata, ĉar mi konsideras, ke ĝi plej bone esprimas la esencon de liaj ideoj kaj de lia heredaĵo al ĉiuj postsekvantoj:

Tra densa mallumo, briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.



Pasis jarcento kaj jardekoj de kiam Zamenhof realigis sian revon kunmeti neŭtralan lingvoprojekton, kiu celas provizi homojn de plej diversaj kulturoj kaj lingvaj grupoj per komunikilo efika kaj demokratiiga, kiu ebligu ĉiujn alparoli unu la aliajn sur ebena egaliga grundo. Tiu ĉi projekto evoluis, kiel eta semo disvolviĝas en grandan arbon. Ambaŭ la semo, kaj la zamenhofa projekto estas mirakloj de la lumo.

Kaj nun la lingvo Esperanto estas la havaĵo de komunumo kiu etendiĝas sur ĉiuj kontinentoj de la terglobo, kiu inkluzivas homojn plej diversajn laŭ raso, aĝo, nacia deveno, seks-identeco kaj seks-inklino, soci-ekonomia tavolo, politika kaj ideologia aparteno, denaska lingvo, nivelo de edukiteco.

Sed kadre de tiu ĉi komunumo, kie la vorto *diverseco* havas plejalte gravan sonon kaj signifon, de tempo al tempo aŭdiĝas vortoj de malpaco kaj defetismo, alvokoj al forturniĝo de la ideo, humiligite fronte al la brilo de oro kaj timigite fronte al la aroganteco kaj malrespektemo de tiuj kiuj posedas la financajn rimedojn kaj la komunikilojn nuntempe rigardatajn kiel internaciajn.

Kaj kompreneble, ĉe ni ne popularas tiom la demando “Kion farus Jesuo?”, malgraŭ la nenebla abundo de kristanoj inter la esperantistoj. Pli nature estus respondi al la demando “Kion farus Ludoviko?” Ĉar li jam forestas dum pli ol jarcento, ni devas turni nin al lia verkaro por trovi taŭgan respondon al tiu ĉi demando.


Unue, vi povas finlegi la poemon *La Vojo*, kaj vi trovos denove kaj denove la ideon ne akcepti malvenkon, ne akcepti malesperon, ne malsupreniri en la tenebron. Ĉar nia vojo pravus, ĉar nia celo estas plej klare homa celo, ĉar nia strebo kongruas kun la observata suprenevoluo de la homa raso. En aliaj lokoj de lia verkaro troviĝas denove la ideo:

Regas ankoraŭ nokto sen luno,  
La mondo dormas obstine,  
Sed jam leviĝos baldaŭ la suno,  
Por lumi, brili senfine.

Kaj tio venigas min al la titolo de la nuna parolado. Iam mi aŭdis kaj estis vere ravita de la proverbo: “La nokto estas plej malluma ĝuste antaŭ tagiĝo.” Do, nek tiam nek nun, mallumo ĉirkaŭanta, noktaj fantomoj, povas forturni kaj fortimigi nin. Ni scias, ke dum certaj periodoj ĉio aspektas malhele kaj je la rando de perdiĝo, ni scias, ke malgrandaj homaj grupoj aŭ plurcentmilionaj loĝantaroj de tempo al tempo faras stultajn decidojn pri kiu parolos kaj agos ilianome, kaj tiaj agadoj, kaj la etoso kiu kreiĝas ĉirkaŭ ili povas efiki malkuraĝige, nin klini al la sento de senespero kaj malvenko.

Sed tiam estas la momento por eltiri la *Esperantan Antologion* el la librobreto, lumigi kandelon en la nokto, danki al LLZ kaj al multaj kiuj postsekvis kaj postsekvas lian gvidan spiritan forton kaj aprezi, ke la tagiĝo ĉiam postsekvas la plej malluman parton de la nokto.

Tagiĝo, tagiĝo radias en rond’,  
La ombroj de nokto forkuras el mond’!



**Orlando E. RAOLA**

Orlando estas membro kaj eksprezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

# Ruth KEVESS-COHEN

Charlotte BURTON

En tiu ĉi rubriko ni intervjuas aŭ alimaniere prezentas niajn membrojn por reliefigi ties aktivecon kaj sukcesojn en Esperantujo.



Ruth KEVESS-COHEN

**D**um longa tempo, Esperanto estis preskaŭ nekonata lingvo. Nur kelkaj lernis Esperanton, ĉar nur kelkaj eĉ sciis, ke Esperanto ekzistas. Nuntempe, centoj da lernantoj finas Esperanto-kurson ĉiumonate. Do kio ŝanĝiĝis?

La ŝanĝo estis la kurso de Esperanto ĉe *Duolingo*,

kaj unu el la ĉefaj motoroj estas Ruth KEVESS-COHEN. Ruth estas administranto de la Duolingo-kurso de Esperanto por parolantoj de la angla lingvo. Ŝi ankaŭ estas unu el la ĉefaj kontribuantoj al tiu kurso kaj unu administranto de la Facebook-grupo *Duolingo Esperanto Learners* [<https://facebook.com/groups/duolingo.esperanto.learners/>], kune kun tri aliaj karegaj esperantistoj.

Oni ne povas trograndigi la efikon de Ruth ĉe la esperantistaro hodiaŭ aŭ en la estonteco. Jardekon post jardeko, la Esperanto-movado kreskis nur malrapide. La gravaj aferoj de Esperanto-USA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj estis informi pri Esperanto. Hodiaŭ, danke al Ruth kaj ŝiaj kunlaborantoj, la Esperanto “arbo” (lecionaro) ĉe Duolingo havas pli ol miliono da lernantoj – kaj tiuj nur en la anglalingva kurso!

Sed ne nur tion ŝi faras. Ŝi laboras por lernantoj ankaŭ post kiam ili finas la Duolingo-kurson. Ŝi trovas, helpas, kaj kuraĝigas milojn da novaj esperantistoj per la forumoj ĉe Duolingo, *afterduolingo.com* [<http://afterduolingo.com/>], kaj Facebook. Ŝi respondas demandojn kaj helpas kunigi komencantojn kaj kompetentulojn.

Kiel diras Filipo DORCAS, “unue ni diris ‘ni semas kaj semas’; nun ni diru ‘ni rikoltas kaj rikoltas.’” Ni ĉe Esperanto-USA dankegas al Ruth kaj la tuta teamo de Duolingo. Pro ilia laborado, ni eniras novan epokon de Esperantujo!

### Hazarda renkontiĝo

Kara redaktoro, mi pensis ke tiu ĉi rakonto amuzos vin. Ĝi estas tute vera krom la fina frazo.

Antaŭ multe da jaroj, kiam mi estis juna kaj aktiva, mi kaj mia amiko decidis grimpi la monton Helvelyn en la norda parto de Anglujo. Ne estis malfacile, sed tiun tagon estis densa nebulo.

Kiam ni preskaŭ atingis la supron, subite la nebulo malaperis. Ĉio ekaperis: la montoj, la arboj, kaj du gehomoj. Unu el ili portis verdan stelon.

“Saluton!” mi kriis al li.

“Saluton”, li respondis.

“Mi ĝojas vidi vin.”

“Kie vi loĝas?” ... kaj tiel plu.

“Ni supreniros, kaj vi?”



“Ni malsupreniros. Ĝis la!”

Mia amiko kaj la amikino de la alia esperantisto estis tiel mirigataj, ke ili ne povis paroli.

“Kiun lingvon vi parolis?” finfine demandis mia amiko.

“Esperanto”, mi respondis.

“Kio estas tio?”

Mi klarigis. Kaj li estis tiel interesita, ke hodiaŭ, li estas pli flua ol mi.

— *Marion KAMINKOW*


### **Skribu al *Usona Esperantisto!***

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



# Rakonto pri uragano Harvey

Steve EICHBLATT



Harvey trafas la marbordon de Teksaso.

**K**reskinte apud la Golfo de Meksiko, en Hustono, mi pensis ke mi konas uraganojn. Ĉiujare unu aŭ du ŝtormoj alproksimiĝas al Hustono. Ĉiam la televidaj meteologoj freneziĝas, kaj preskaŭ ĉiam la ŝtormoj trafas aliloke, sen damaĝi la urbon.

Foje, se uragano estas granda, oni eĉ evakuas la urbon. Kaj ankoraŭ la ŝtormo ne trafas.

Eĉ pli malofte, uragano ja trafas. Elektro ne estis havebla dum kelkaj tagoj, kelkaj grandaj arboj falas, kaj la vivo daŭras pli malpli senŝanĝe.

Do mi iomete pridubis avertojn pri uraganoj. Almenaŭ en Hustono, kiu situas 40 mejlojn for de la maro.

Nuntempe mi loĝas en Novjorko, kaj kiam mi aŭdis avertojn pri uragano Sandy en 2011, mi spertis la samajn dubojn. Eĉ la tagon poste, mi ne opiniis la ŝtormon grava. Sandy kaŭzis nek ventegon nek pluvegon ĉe mi. Mi nur perdis aliron al Interreto dum du horoj, kia teruro! Sed kiam mi iris al la laborejo, kaj aŭdis la rakontojn de miaj kolegoj, mi komprenis la gravecon de la marŝvelo. Nur tiam mi eksciis, ke Sandy estis la plej grava ŝtormo, kiun mi spertis en mia vivo.

Klare, mi pensis, mi ne konas la uraganon.

Mi aŭdis pri uragano Harvey per televidilo en mia oficejo en Novjorko. Ĝi montris la kutimajn bildojn: raportiston sur plaĝo, palmarbojn skuatajn de ventego, ktp. Amikoj en Novjorko demandis min, ĉu mia familio en Hustono fartas bone. Mi diris “Jes, kompreneble. Hustono ne havas digojn kiel Nov-Orleano, kaj la maro ne ŝvelas.” Sed samtempe mi scivolis: kian surprizon ni povas atendi? Post du tagoj, mi telefonis al mia familio en Hustono por demandi, kiel ili fartas en la ŝtormo.

Surprize, mia patro respondis ke la vento tute ne gravas, sed la pluvo ja gravas. Ĉie en la regiono la pluvo faladis forte kaj senĉese. La akvo ne havis eliron. Hustono estas pli plata ol telero; la plej alta loko situas nur 50 futojn super la marnivelo. Ĉar ĝi ne havas deklivojn, ne ekzistas grandaj riveroj tie, sed multaj riveretoj. La grandega pluvo (entute falis 50 coloj da pluvo dum la ŝtormo) kolektiĝis en flakegoj sporadaj.

La kvartaloj plej malaltaj kaj plej proksimaj al riveretoj inundiĝas unue. Homoj kiuj loĝas pli alte povas nur atendi kaj rigardi la plialtiĝon de la akvo, esperante ke ĝi ne atingos iliajn pordojn.

La plejparto de la hustonanoj ne havis akvon en siaj domoj. Sed dum tri tagoj kaj noktoj, rigardante la plialtiĝon de la akvo, ili pli kaj pli maltrankviliĝis.

La akvo ĝenerale estis ne tre profunda; ĝi atingis eble nivelon de homa brusto. Tamen aferoj en la urbo haltis. Oni ne povis forveturi, ĉar la flakegoj estis ĉie. En ĉiu direkto la vojoj estis inunditaj.

Inter miaj amikoj kaj familio, nenies domo inundiĝis. Mia frato eskapis sian domon helpe de savistoj en boatoj, ĝuste antaŭ la fino de la ŝtormo. La akvo estis nur kelkajn colojn sub lia pordo. Fremduloj gastigis lin dum la akvo malleviĝis. Post la ŝtormo li trovis, ke lia domo ne estis inundita.

Mia nevino kaj ŝia familio gastigis amikojn kies domo inundiĝis. Amikoj de mia familio suferis damaĝitajn domojn. Aliaj amikoj perdis siajn aŭtojn. Feliĉe, miaj aliaj familianoj povis resti ĉe siaj

domoj, sed ili sentis sin multe pli trankvilaj kiam la pluvo ĉesis.

Neniu konata al mi aŭ mia familio mortis en la ŝtormo, kvankam estis kelkaj malbonŝanculoj, kiuj pereis.

Eble parto da la severeco de Harvey estis homfarita. Oni parolas pri tutmonda varmiĝo, kaj eble ĝi ludas rolon en la ŝtormo. Pli certe, en la lastaj tri jardekoj Hustono multe kreskis, kaj la kvanto da betonkovrita grundo eble duobliĝis. La betono malebligas rapidan dreniĝon.

Mi vizitis mian familion en Hustono tri semajnojn post la ŝtormo, kiam la akvo estis jam plejparte malleviĝinta. Do mi ne vidis la altnivelan akvon. Sed mi vidis, malpli ol unu mejlon for de la hejmo de mia patro, stratojn flankitajn de trasorbiĝinta ligno kaj ruina dom-materialo. Dek mejlojn for mi vidis grandegan parkejon, kie staris ĉirkaŭ 3000

fridujojn. Se oni konsideras ke ĉiu fridujo venis el hejmo inundita, tio estas malgaja vido.

Antaŭe, Hustono ĉiam estis vere amika urbo. La loĝantoj facile parolis kun fremduloj. Feliĉe, la uragano ne ŝanĝis tion. Sed dum mia vizito mi rimarkis, ke la plej populara temo estas “kiel vi fartis dum Harvey?” Malgraŭ la detruado de multaj domoj, la spirito de houstonanoj ŝajnas senŝanĝa, almenaŭ ĝis nun.



**Steve EICHBLATT**

Steve loĝas en Novjorko kun sia edzino kaj filino. Li estas fizikisto, programisto kaj financisto. Li ŝatas legi, esplori la urbon, aŭskulti muzikon de Bob DYLAN, kaj esti kun sia familio.

<steve.eichblatt@gmail.com>

## ***senintenca esperantaĵo?***

### **“Ido”**

*Steve EICHBLATT*



La jenan butikon fotis membro Steve EICHBLATT dum lastatempa vizito al Ĉinujo. Ĉu temas pri sekreta nesto de la fiaj Idistoj, finfine malkovrita?! Nu, eble ne.

Steve proponas alian teorion: “La butiko vendas aferojn por la edziniĝo, nature la rezulto estas ido.”

# La ŝtelanta klaŭno

Daĉjo RUTAN

Profesoro Ŝibolet estis ĝuanta distraĵojn dum sia ĉiujara vizito al la Granda Ĉirko, kiam li aŭdis kverelon ekster proksima ruldomo. Tie li trovis klaŭnon kaj du virinojn.



“Ne estis mi!” kriis la klaŭno.

“Jes ja! Mi vidis vin!” respondis barbulino. La alia virino nur staris silente, tenante sian kapon.

Ŝibolet alproksimiĝis kaj diris, “Mi proponas ke mi provu solvi vian disputon.” La trio interrigardis kaj kapjesis. Ŝibolet sekvis ilin en la ruldomon.

Ridigo la Klaŭno, ankoraŭ vestita en komika kavalira kostumo el metalaj potoj kaj patoj, paŝis tintegante kaj klakegante al proksima seĝo kaj sidiĝis. “Estas vere”, li diris, “mi preterpasis la ruldomon de Pandoro antaŭ eble dek minutoj, sed mi nek enrompis ĝin nek ŝtelis ion ajn.”

Barbara, la barbohava virino, diris, “Mi vidis lin eliri el la ruldomo, meti sakon sub sian brakon kaj rapide foriri.”

“Eble vi estas superŝutita, Barbara”, diris Pandoro,

la trapezisto. Ĉiuj scias, kie mi tenas mian monon. Kial Ridigo batus min kaj ŝtelus de mi? Li estas membro de la cirko jam de dek jaroj!”

“Restu trankvile”, diris Profesoro Ŝibolet. “Pro tiu ŝvelaĵo sur la kapo vi bezonas kvieton.”

“Ne zorgu pri mi”, diris Pandoro. “Penu trovi la ŝteliston. Mi estis ripozanta en la ruldomo, legante libron. La pordo estis malantaŭ mi, kaj mi ne aŭdis iun eniri. Per kio li batis min?”

“Evidente per ĉi tiu potoj”, diris Ŝibolet, indikante difektitan metalan kuirpoton.

“Sed tio ne estas mia!” protestis Ridigo.

“Ne kredu lin.” diris Barbara.

Ŝibolet pririgardis Ridigon. Poste li fiksrigardis Barbaran, kaj diris: “Via provo kulpigi Ridigon ne efikos.”

---

Kiel Profesoro Ŝibolet sciis, ke Barbara provis kulpigi Ridigon? Bonvolu sendi **nur unu** solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 28-a de Februaro**. Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn.

---